

TEA-BULTENO

3^a JARO






MARTO 2000

NUMERO 3



AGENDO



- 1 M
- 2 Ĵ
- 3 V Kartludado: Rumio 
- 4 S
- 5 D
- 6 L h. 17 - Legemuloj kunvenas
- 7 M Ordigo de TEA-arkivo
- 8 M
- 9 Ĵ
- 10 V Diapozitivoj el la mondo 
- 11 S
- 12 D
- 13 L h. 17 - Legemuloj kunvenas
- 14 M Ordigo de TEA-arkivo 
- 15 M
- 16 Ĵ
- 17 V Interreta navigado
- 18 S
- 19 D
- 20 L h. 17 - Legemuloj kunvenas
- 21 M Ordigo de TEA-arkivo 
- 22 M
- 23 Ĵ
- 24 V Legaĵoj el LA ESPERANTISTO (1889-1895)
- 25 S
- 26 D
- 27 L h. 17 - Legemuloj kunvenas
- 28 M Ordigo de TEA-arkivo 
- 29 M
- 30 Ĵ
- 31 V Nova gasto: La kolbaseto el Ferrara

Ĉiam aktuala!

Daŭre oni legas pri laste aperintaj libroj, pritraktantaj novan (kaj/aŭ malnovan) problemaron ene de nia movado; nome, multaj klopodas kaj provas, post sistema, kritikema analizado de la ĝisnunaj agad-metodoj, eltrovi kaj proponi, ankaŭ por adaptiĝo al la nuntempa cirkonstancaro, pli modernan procedaron, por plibonigi la propagandajn kaj informadajn sistemojn de esperantistaro. Do, abundo da tiuj konsiloj, kiuj ofte restas porĉiame nur en formo de efemeraj konsiloj, neniam konkretiĝontaj aŭ realigeblaj, enŝoviĝas en niajn ĵurnalojn, en niajn raportojn ks. Tio estas normala kaj eĉ deviga afero, alimaniere ni estus postrestintaj en praepoko. Sed mia persona intereso, de tempo al tempo, direktiĝas ankaŭ al nia pasinteca historio, por ĉerpi ideojn, ekscii pri alitempaj vidpunktoj, esplori aliajn eblecojn cele al tiu revo kiu ekzistis tiam kaj ekzistas ankoraŭ nun. Jen kion mi trovis plej laste, certe al la plejmulto el vi jam konatan, sed estu paciencaj, kaj relegu ĝin, ĉar la zamenhofaj vortoj daŭre aktualas!

«Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: «Kiu pli laŭte krias, tiu estas prava». Per unueco ni pli aŭ malpli frue nepre venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povas fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava, socia problemo, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi.»

(L.L. Zamenhof - *el Parolado por la malfermo de la 8a Kongreso, Krakovo, 1912*)



Semajno de Internacia Amikeco jam estas for, sed Amikeco, per si mem, neniam estos for. En ĉiu ajn tempo, homo bezonas amikon, bezonas personon sur kiun verŝi siajn sentojn, al kiu konfesi siajn dubojn, al kiu rakonti proprajn problemojn, proprajn okazaĵojn, belajn aŭ malbelajn... *Kiu trovas amikon, tiu trovas trezoron* – diras proverbo. Granda vero: pro tio kiu havas sinceran amikon, tiu neniam sentos sin sola, ĉiam trovos komprenemon, helpon, apogon. Ni ne forgesu tion.

Trale tante la elektronika poŝton, mi trovis belegan mesaĝon, senditan de *Romano Bolognesi*, tre pensigan, kiun mi zorge tenos en tute aparta loko, ene de mia koro, esperante neniam forgesi ties signifon. Certe ĝi helpos min iĝi pli tolerema, pli konscia pri la granda valoro havi Amikon.

«Jam estis iu malbonkarakterita knabo. La patro donis al li saketon da najloj, dirante al li enfiksi unu en la palisaron de la ĝardeno, ĉiufoje kiam li senpacienĉiĝos aŭ kverelos kontraŭ iu.

La unuan tagon la knabo enbatis 37 najlojn. Dum la sekvaj semajnoj, li eklernis memregadon kaj la nombro de najloj, enmetitaj en la palisaron, de tago al tago malpliĝis: li fakte malkovris, ke pli facilas bridi proprajn emociojn ol marteli najlojn. Finfine alvenis la tago, en kiu la knabo neniam najlon enfiksis en la palisaron. Tuj li alportis al la patro tiun anoncon. Je tio la patro diris al li, elpreni el la palisaro po unu najlo, ĉiun tagon en kiu li ne senpacienĉiĝis kaj koleris kontraŭ iu. La tagoj pasadis kaj finfine la knabo sciigis pri la bela novaĵo, ke ĉiuj najloj estis forprenitaj. La patro lin kondukis antaŭ la palisaro kaj tiel parolis: «Filo mia, vi bone faris, sed rigardu kiom da truoj postrestis en la palisaro. Neniam plu ĝi estos kiel antaŭe. Kiam vi kverelas kontraŭ iu kaj ion malagrablan diras, tiajn vundojn vi lasas. Vi povas enpiki ponardon en iun homon, kaj poste ĝin forpreni, sed por ĉiam restos vundo; ne gravas kiom da fojoj vi pardonpetos: tiu vundo restos.»

Langa vundo doloras kiom la fizika. Amikoj estas raraj juveloj, ili ridiĝas vin kaj vin kuraĝigas. Pretas ili vin aŭskulti, kiam bezonate, vin subteni kaj ilia koro estas al vi malfermita.

Aldonitaj estis ankaŭ la ĉisupraj frazoj, kiuj multe impresis min. Dankon al Romano Bolognesi kaj al la nekonata amiko, kies anekdoto kaj posta komento kortsuŝis profunde min. En nunaj momentoj, estus bone iom pli pensi kian grandan trezoron ni posedas kaj kiun ofte ni emas forgesi.



Inventista Klubo serĉas kunlaborantojn

Kvankam la Inventista Klubo havas nuntempe nur kelkajn aktivajn membrojn kaj agentojn, la rezultoj estas mirindaj. Sed ankoraŭ pli mirindaj estas la ebloj kaj la planoj de tiu klubo. Pro tio ĝi serĉas novajn interesiĝantojn pri la kunlaboro. Bonvenaj estas novaj inventistoj kaj klubaj agentoj, kiuj perus la kontakton inter la klubo kaj la enlandaj inventistoj (tiuj povas esti ankaŭ neesperantistoj) aŭ inter la aŭtoroj kaj interesiĝantoj pri la komerca eluzo de la inventoj. La agentoj ne devas esti patentaj specialistoj: pli gravas la komerca talento, spertoj, aktiveco, inventemo kaj kreemo. Por eviti miskomprenojn estas tamen postulata deca lingvoscio de Esperanto. La agentoj do, reprezentas la interesojn de la Inventista Klubo kaj de ĝiaj aŭtoroj-inventistoj sur la teritorio de sia lando, serĉas novajn malkovrojn kaj inventojn, registras ilin pere de la klubo kaj proponas por la komerca eluzo en sia lando la jam registritajn inventojn el la arkivoj de la klubo. La organizo kaj ties agentoj plene respektas la aŭtorrajtojn kaj peras la kontraktojn nur post interkonsento kun la aŭtoro, tenante en diskreteco ĉiujn detalojn pri la inventoj, aŭtoroj kaj membroj. **Prof. Bruno Dalla Pozza - Box 607, CK, Saipan, MP-96950 Usono. Rete: dobruno@itecni.com**

KIU KONSTRUIS LA UNUAN AŬTOMOBILON


Germain Pirlot

Mi volas atentigi pri kontraŭdiroj en argumentado de kelkaj aktivuloj.

Antaŭnelonge aktivulo skribis al iu gravulo pri la lingva problemaro ene de EU kaj pledis favore al Esperanto. Li ja substrekis la facilecon de la lingvo, kaj por pruvi ke tiu lingvo tamen estas sufiĉe riĉa, li menciis i.a. PIV kun 1303 paĝoj kaj la «Plenan Analizan Gramatikon, PAG» kun 599 paĝoj. Ĉu lingvo, kiu bezonas 600-paĝan gramatikon, povus esti facila?

Ni povus kompari nian argumentadon al tiu de la aŭtovendisto: ĉu li rakontas al kliento, ke la unuan aŭtomobilon kreis franca inĝeniero *Eduard Delamare-Deboutville* en 1883? Tute ne! Kliento interesiĝas nur pri la nuna efikeco de la veturilo. Sekve pri Esperanto ni klopodu pruvi ĝian efikecon per konkretaj aplikadoj por plej diversaj celoj, ekzemple kiel laborlingvo de AIS, pro fakaj celoj aŭ pro kultur-artaj aranĝoj, festivaloj.

Kuba Komitata Kunsido



De la 27^a ĝis la 29^a de januaro, okazis la 17^a Nacia Komitatkunsido de Kuba Esperanto-Asocio, en la gastama urbo Santiago de Kubo. La kunveno estis la hotelo *Villa Trópico*. La Nacia Komitatkunsido estas la supera decidoprena organo de KEA: ĝin do partoprenas ĉiuj estraranoj kaj naciaj Komisiitoj, plus komitatanoj el ĉiuj provincoj.

Post la jaŭda Interkona Vespero, la laborsesioj komenciĝis per florkrona omaĝado al la Nacia Heroo *José Martí*, ĉe lia maŭzoleo en la tombejo *Santa Ifigenia*, ĉar la 28^{an} de januaro estas la datreveno de lia naskiĝo, kaj tiutage estas kutimo en Kubo, solene lin honori. Skipo de la nacia televido estis tie, kun la celo filmi la diversajn ceremoniojn fare de la oficialaj instancoj, inter kiuj la Ĉefsekretario de la Partio en la provinco. Interese estas, ke li tuj rekonis la esperantistojn, kaj sekve rememoris pri la tempo, kiam li, tiama Parti-sekretario en Havana Municipio, inaŭguris ekspozicion pri Esperanto. Nia omaĝo al *Martí* do spekteblis ankaŭ per la loka kaj nacia televido.

Tri laborsesioj analizis ĝisfunde la estraran raporton de la jaro 1999 kaj fiksas la ĉefajn taskojn de Kuba Esperanto-Asocio por la jaro 2000. Denove la unua prioritata tasko rilatis al informado. Gravaj decidoj kernernis la okazigojn de naciaj renkontiĝoj en Havano (oktobre) kaj Guantánamo (decembre), seminario pri informado en Sancti Spíritus fine de septembro, la 9^a seminario por instruistoj en Havano (julie), infana renkontiĝo en Guantánamo (julie) kaj ankaŭ SAEST (Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en Havano (maje).

Do, la jaro 2000 montriĝas plenplena je taskoj. Antaŭvideblas novaj prezentoj ĉe radiostacioj kaj televido. La venonta nacia komitatkunsido okazos en la provinco Villa Clara venontjare.

(Raportis: Alberto García Fumero, Sekretario pri Informado de Kuba Esperanto-Asocio, kubesp@ip.etecca.cu)

En Eŭropo, ĉiuj homoj havas horloĝon, sed ne niu havas tempon.

(Afrika Proverbo)

Invito al Samarkando en la koro de la Granda Silka Vojo

Ankaŭ VIN atendas la Azia Esperanto - Renkontiĝo "AERO - 2000" okazonta sub aŭspicio de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO en la 2750-jara Samarkando, de la 15^a ĝis la 20^a de aŭgusto 2000. Sojle de la nova miljaro AERO celas doni freŝan inspirigan aeron al la azia esperantistaro kaj akceli E-movadon en la regiono. Fakte ni ĝojus bonvenigi gastojn el ĈIUJ kontinentoj.

Tre enhavo-riĉa la programo: seminario pri E-movado en Centra Azio, sinprezento de aziaj E-klubo, instruista seminario, intensaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj, internacia arta vespero, 2-hora ekspresa kurso de la uzbeka lingvo, Esperanto-loterio, gustumado de famaj uzbekaj vinoj, pikniko en la montaro, vizitado (kun esperantlingva ĉiĉerono!) al mondfamaj vidindaĵoj de antikva Samarkando ktp. Laŭdezire aranĝeblos ankaŭ postaj ekskursoj al Buhhara, Taŝkento, Ŝahrisabz, Pengikent (Taĝikistano) ka.

Ĉefa organizanto:

Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, Samarkando

Pliaj detalaj informoj kaj aliĝilo haveblas ĉe:

Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro

P.O. Box 76, UZ-703000 Samarkando, Uzbekio.

Rete: peacetur@samuni.silk.org

(bv. NE sendi LONGAJN retmesaĝojn!)

Eŭropa Konferenco pri la lingvoj

Andrea Chiti-Batelli

"Propono de konstanta internacia konferenco pri la riskoj de estingiĝo de la eŭropaj lingvoj kaj pri la maniero preventi ilin."

Eŭropa Unio estas dediĉonta la jaron 2001 al la instruado de la lingvoj kaj al ĝia kreskigo. Mi estas konvinkita, ke tio estas eraro: plurlingveco estas jes favorenda, sed nur en la elitoj; por la plej multaj homoj ĝi estas same nerealigebla kiel neutila. Tio, kion Eŭropo – kaj la mondo – bezonas estas unueca helplingvo: tio estas objektiva kaj nemodifebla postulo, ĉar sekvo kaj nepra neceso de la ekonomia, scienca, kultura progreso.

Tamen se tiu lingvo estos – kiel jam ĝi estas fariĝanta – la angla, tiu ĉi, kiel ĉiuj vivantaj etnaj lingvoj metitaj en superregan pozicion, estos **lingvovora** kaj **etnodetrua**, nome detrua samtempe de la eŭropaj lingvoj, aliaj ol la angla, kaj de la kulturoj, kies portantoj ili estas (1).

La ekzemplo de la latina lingvo, kiu detruis grandan parton de la originaj lingvoj de la antikva Eŭropo, ne allasas dubojn ĉi-teme: la hegemonia lingvo de hegemonia imperio estas nature netolerema kaj detrua; kaj *contra factum non datur argumentum* (kontraŭ fakto ne ekzistas argumento).

Malfrue, sed eble ankoraŭ ene de la tempolimo, sociologoj kaj lingvistoj komencas ekkonscii pri la danĝero, same kiel malfrue, sed eble ankoraŭ ene de la tempolimo, oni ekkomprenis la mortigan riskon kunligitan al la poluado, kvankam, ankaŭ en tiu ĉi kampo, tro malrapide kaj tro milde oni klopodas estigi la rimedojn kontraŭ ĝi.

Sed la latina lingvo, poste fariĝinte malviva lingvo, instruas ankaŭ ion alian: ke lingvo ne plu denaska por iu ajn, povas havi dum jarcentoj superregan pozicion, en la mondo de la kulturo kaj de la internacia komunikado,

same kiel la latina havis dum la tuta Mezepoko, sen havi plu tiun lingvovoran efikon, pri kiu ni diris, kontraŭe eĉ ne malhelpante la liberan disvolviĝon de la latinidaj vulgarraj lingvoj kaj de la ceteraj eŭropaj lingvoj.

Tial mi estas konvinkita pri tio ke la sola *lingua franca* kiu povos savi la plurlingvecon estas Esperanto (sola planlingvo uzopreta, ĉar ĝia funkcikapablo estas atestita de pli ol jarcento da uzado en ĉiuj kampoj (2)).

Eŭropa Unio, se ĝi sukcesos "fariĝi ŝtato" kaj doni al si politikan konsiston kaj kapablon je aŭtonomeco kaj sendependeco, havos duoblan intereson tiudirekte: nome interna (federacia ŝtato bezonas oficialan lingvon, kaj nur neŭtrala lingvo metus ĉiujn ĝiajn membrojn en egalrajtan pozicion) kaj ekstera (nur liberigante sin de la angla, kaj helpante la ceteran mondon fari la samon, Eŭropo povos efektive starigi sian politikan sendependecon, kies esenca parto estas la kultura sendependeco). Sen tiu nova granda eŭropa ŝtatpotenco, kontraŭe, la nuna superregado de la angla – malgraŭ ĉiuj kvalitoj de Esperanto – ne havos kontraŭpezon kaj restos senalternativa.

Tiuj ĉi estas la kialoj, pro kiuj mi diris ke la nuna plurlingvisma politiko de Eŭropa Unio ŝajnas al mi erara kaj misvojiga: plurlingvismo ne helpas realigi iun ajn el la supre indikitaj celoj. Sed mi estas same konvinkita, bedaŭrinde, ke estas neeble modifi, *hic et nunc* (= en la nuna situacio), tiun politikon, kaj des malpli en tiel ĝisradika maniero, kiel al mi ŝajnas nepre necese.

Tial mi redaktis proponon intence tre pli moderan kaj realisman – kiu intertempe trovis la aliĝon de kelkaj Esperanto-asocioj – celantan favori, danke al tiucela internacia konferenco, la studon de la problemoj kaj la konsciiĝon pri la supre montrita danĝero, sen antaŭjuĝi, pormomente, la solvojn, kiuj devos esti la konsekvencoj de la sugestata debato, kaj ne ties deviga premiso. Debato, kiu devos esti malfermita al ĉiuj voĉoj, al ĉiuj sugestoj, al ĉiuj solvoj, kiujn la partoprenantoj volos indiki kaj priargumentadi.

Se la diskuto estos serioza kaj profunda, kaj la partoprenantoj estos altnivelaj, mi estas konvinkita pri tio, ke la voĉo de la racio fine trudos sin, kaj kun ĝi la sola solvo kapabla vere kaj definitive forturni la riskon je «lingva Ĉernobilo», kiu nin minacas. Jen do mia propono - kiu, post la menciitaj aliĝoj, ne povas plu nomiĝi nur mia kaj devas esti rigardata kvazaŭ Manifesto, malfermita al la subskriboj de ĉiuj, kiuj volos aliĝi al ĝi (3).

- (1) Mi ŝuldas tiujn ĉi du novajn vortojn (*glottofagico* = lingvovora kaj *etnolitico* = etnodetrua) respektive al Louis-Jean Calvet, «Linguistique et colonialisme», Parig, Payot, 1974, kaj al Michel Rimet, Contacts. «Interférences ethniques et culturelles», Montpellier, ĉe la aŭtoro, 1970. Mi pli vaste disvolvis la tezon, tie ĉi defendatan, en mia libro «L'insegnamento delle lingue nella Comunità Europea. Stato attuale e prospettive future», Roma, Armando, 1987.
- (2) Claude Piron, «Le défi des langues», Parig, L'Harmattan, 1994; Pierre Janton, «L'espéranto», Parig, P.U.F., plurfoje represita; itala traduko, Milano, Coedes, 1996 (ĉe ITALA ESPERANTO-FEDERACIO).
- (3) Tiujn aliĝojn oni povas sendi al la Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, Umberto Broccatelli, Via G. Brodolini 10, 00139 Roma, Italio, retadreso: u.broccatelli@tiscalinet.it

Konkurso de infandeseĝnaĵoj

Ni invitas ĉiujn instruistojn kiuj regule, aŭ foje, instigis siajn gelernantojn al konkursa partopreno, denove sendi desegnaĵojn al:

Esperanto en Vendomois,
Les Monts, FR-41360 Lunay, Francio



Konkursaj reguloj

TEMO: La Feliĉo: Kio feliĉigas vin?

FORMATO: minimume 40x30 cm

KATEGORIOJ:

A → ĝis 7 jaroj

B → pli ol 7 ĝis 10 jaroj

C → pli ol 10 ĝis 14 jaroj

LIMDATO: 25^a de majo 2000

Dorse de la desegnaĵoj notu nomon, aĝon, adreson de la lernejo kaj koncizan priskribon de la verko.

Al ĉiu kategorio oni atribuos 3 premiojn, kiuj konsistos el libroj, kasedoj, kompaktaĵoj, T-ĉemizoj, puzloj. Ĉiu infano ricevos partoprenan diplomon.

Ret-adreso: esperanto.en.vendomois@mail.dotcom.fr

Tra la mondo por instrui kaj koni aliulojn!

En **Japanio** oni serĉas Esperanto-instruiston, prefere por duona, **preferege** por tuta aŭ pluraj jaroj. Instruokapablo de angla lingvo estas avantaĝiga. Entuziasmo kaj bonvolo pli gravas ol sperto. La salajro estas bona kaj la flugoj estos repagitaj. Por ĉiaj informoj, vi povos kontakti Lode Van de Velde (kiu mem laboris tie jam dum du jaroj) ĉe la jena adreso: lode@fel.esperanto.be

En **Ĉinio**, Universitatoj de Pekino **urĝe** bezonus kelkajn instruistojn kiuj kompetentas pri instruado de angla kaj Esperanta lingvoj. Oni ricevos tute senpagajn manĝojn kaj loĝejon, plus unu aŭ du vojaĝojn tra la lando, ĉiujare. Monata salajro egalas al 1500-2000 Yuan. 2000 Yuan valoras ĉirkaŭ 250 dolarojn. Tamen oni mem devas pagi la ir- kaj reven-kostojn. Tiu sumo povas ŝajni malmulta, sed ja sufiĉa por vivteni tri homojn en Ĉinio. Esperanto-instruado celos ĉefe la junulojn kiuj partoprenos en la Internacia Junulara Kongreso, okazonta en Hongkong venontsomere. Tiu ĉi ebleco tute taŭgas por tiaj samideanoj kiuj deziras sperti Ĉinion. Por pliaj informaj detaloj kontaktu:

PENG Zhengming - Ĉinio - dedhea@public.ŭh.hb.cn

24^a INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO

La **Federazione Esperantista Italiana** e l'**Istituto Italiano di Esperanto** comunicano che durante il Festival Internazionale Giovanile, che si terrà a Cavallino (Venezia) dal 19 al 25 aprile 2000, avrà luogo un seminario sulla didattica e l'insegnamento dell'esperanto.

Il seminario, guidato dalla brillante esperantista ungherese **Katalin Smidéliusz**, avrà luogo nella sede del Festival e si svolgerà da giovedì 20 (pomeriggio) a sabato 22 aprile per un totale di circa 15 ore (orari indicativi: giovedì 20 aprile: ore 14.30-18.00; venerdì 21 e sabato 22 aprile: ore 9.00-12.00/14.30-18.00).

«Ni instruu ne tradicie, sed amuze!»

Iom pli detale: seminario kiu donas bonajn ideojn por riĉigi utile la lingvokursojn kaj kunvenojn. Ludoj, konversaci- kaj verk-ekzercoj, dialogoj, teatraĵoj, film-sinkronigo, kaŝitaj gramatikaĵoj.

Per informazioni, riguardo vitto, alloggio ed adesioni al Festival, rivolgersi alla Gioventù Italiana Esperantista; per quanto riguarda il seminario a **Laura Brazzabeni** tel. 03767926099 (ore serali) o 03391522925 (pomeriggio) oppure alla **FEI** 0258100857 (nei giorni di martedì e giovedì) o all'indirizzo e-mail: lbrazza@libero.it È a vostra disposizione anche la segreteria dell'Associazione esperantista triestina.

JAM 685 ALIĜIS AL TEL-AVIVO

La 20^{ma} de januaro, kiam plejmulto de la aliĝoj ĝis la fino de la unua aliĝperiodo estis jam registrita, la 85^a Universala Kongreso en Tel-Avivo nombris 685 aliĝintojn el 47 landoj. Sekve la ritmo de aliĝoj kompareblas kun tiu de la Adelajda UK en 1997, kies fina nombro estis 1224. La pinton de la statistiko konsistigas Germanio (76), Japanio (71), Pollando (55), Israelo (54), Francio (49), Nederlando (45), Italio (27), Usono (25) kaj Brazilo (20).

TRAJNA KARAVANO AL HONKONG

TEJO preparas neforgeseblan travivaĵon lige kun la ĉi-jara IJK en Honkongo. Temas pri trajna karavano el Moskvo al Honkongo, kiun **TEJO** organizas kune kun siaj landaj sekcioj en Rusio (**REJM**) kaj Ĉinio (**ĈJEA**). La karavano startos la 17^{ma} de julio, el Moskvo. De tie ili vojaĝos tra Siberio, Mongolio kaj Pekino al la sudĉinia metropolo. Eblas legi en la reto pli detalajn informojn kaj printi paperan aliĝilon: <http://tpp24.net/Holger.Boos> kaj baldaŭ <http://www.esperanto.org/internacia/tejo>. Bonvolu atenti, ke pro organizaj kialoj oni povas akcepti aliĝojn nur ĝis la 1^a de majo!

Etaj informoj

Servo per elektronika poŝto ĉe TEA

La elektronika poŝto estas je dispono de la asocioj, por ricevo kaj sendo de privata korespondado, kontraŭpage de la kosto de konekto kaj telefonad-daŭro.

Manifesto 2000

Eblas daŭre subskribi ĉe **TEA** la deklaron pri persona engaĝiĝo favore al kulturo de paco kaj senperforto. **UNESKO** celas kolekti 100 milionojn de subskriboj. Ankaŭ vi mem kontribuu! Esperantistoj des pli devas tion subteni.

Laŭdinde!!!

Enkadre de sia propaganda agado, **FEI**-estraro alprenis la decidon antaŭmendi 800 ekzemplerojn de la Itala-Esperanta Poŝvortaro zorgota de **Vallardi**, por tiel ebligi ties rapidan eldonadon.

La enhavo de ĉi tiu Bulteno parte ŝuldeblas al RET-INFO - Hungario - parte al NOVA SENTO.

BULTENO de la membroj de

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Crispi 43 - 34125 Trieste

Tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@tiscalinet.it

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349